# VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského klubu v Mnichově Hradišti,
pro členy a příznivce mezinárodního jazyka.
Odpovědný redaktor: MUDr Josef Hradil, 29501  Mnichovo Hradiště, Družstevní 1161
Cena: dobrovolný příspěvek
Povolil OÚ Ml.Boleslav, odb.kultury čj.47/87-403/16
Podávání novinových zásilek povoleno oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze, čj.P/Fiš 2295/92 ze dne 16.XI.1992

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx
Numero 1 Januaro 1995 Leden Číslo 1
xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

KONFERENCO de Ĉeĥa Esperanto Asocio en Česká Třebová (4.-6.XI.1994) kvankam vizitata kun pesimismaj antaŭjuĝoj, konstatis, ke ankaŭ ekonomie pli modestaj kondiĉoj trovis nia movado sian manieron de ekzistado kaj ke la ideo de Internacia Lingvo estas senmorta.

Vendrede, la 4an de novembro kunveturis 111 partoprenantoj de la konferenco (el ili reprezentantoj de 38 kluboj, 4 sekcioj, 9 honoraj membroj, 36 libere pagantaj gastoj sen mandato, 9 komitatanoj kaj 15 organizantoj) por ĝui jam multfoje pruvitan amikan medion, kreitan de kelkaj entuziasmaj unuopuloj el bela regiono de tiu ĉi fervojista centro. Partopreno de gastoj, kiuj venis propramone nur por ĝui amikan etoson montras la bezonon de ne tro multekostaj renkontoj, kiuj jam per atingebla prezo garantias sukceson.

Vendreda vespero estis dediĉita al projekciado de interesaj diapozitivoj. S-anino Novotná prezentis sian vojon al Usono, ŝian restadon tie kaj viziton de tieaj esperantistoj. La prezidanto de ČEA ing Vlastimil Kočvara prezentis kun interesa prelego belegajn diapozitivojn pri sia vojo al Koreio kaj Japanio kaj partopreno de la Universala Kongreso en azia grandurbo Seulo, alproksimante ĝisdetale la vivon de simplaj homoj en tiuj ĉi landoj. Al multaj ĉeestantoj, kiuj ne havis eblon viziti Universalan kongreson, la prezentado alproksimigis ĝian etoson. Valoraj estis informoj pri la traktadoj de la komitato el vidpunkto de nia samnaciano. Informoj el la „verda kuirejo“ estis por ĉiuj tre interesaj kaj estos transdonataj al la kluboj. Post diapozitiva prezentado ni disiris kaj dum malfavora vetero kun malvarma forta vento ni transiris en nian dormejon – por la pliparto studenta hejmo – distance je 2 kilometroj. Tamen neniu plendis kaj la oferemaj třebovanoj transportis la plej aĝajn per siaj aŭtomobiloj.

Sabato estis la ĉefa tago de traktado. Solenan prelegon okaze la 25jara datreveno de nia asocio prezentis s-ano Ing Chrdle. Li koncize skizis la agadon, rememoris ĉiujn okazaĵojn kaj meritplenajn gesamideanoj. Speciale estis pritraktita la agado de la du lastaj jaroj.

Grava estis estinjara kuna konferenco de germanaj kaj ĉeĥaj esperantistoj en Karlovy Vary. Temis pri prestiĝa konferenco, dum kiu multaj skeptikuloj antaŭtimis grandajn elspezojn, kiuj povis priminaci la kasojn de la asocioj. Tamen la kuna konferenco finis sen financa malprofito kaj estis bona propagando en tiu ĉi mondkonata banejurbo, kie la publiko povis ekkoni bazajn informojn pri nia movado. Ing Chrdle plue informis pri sekvanta kriza stato de nia sekretariejo en Prago, Jílská strato. La luprezo por vendejeto en tiu malnovurba tiom multobliĝis, ke ne estis eble plu resti ĉi tie. La unua paŝo – disduonigo de la spaco kaj luo por la glasvendejo – montriĝis nesufiĉa. Eĉ ne restis mono por la pago de la sekretario kaj oni devis fari decidajn paŝojn. Nia kaj kaj oferema sekretario inĝ. Pluhař eksiĝis el la funkcio pro malsano kaj pli poste rentiĝis. Tamen dum sia malsano li venadis en la sekretariejon kaj forportis poŝtajn sendaĵojn, kiujn li ofereme respondis. La komitato reagis je nova situacio per altigita peno kaj klopodo: por la vakanta loko en la komitato estis tre konvene elektita Květa Hubnová, praganino, estinta estrino de la klubo en Prago, kiu kapablas freŝe prilabori la taskojn de la estinta sekretariejo. Havi propran tegmenton super la kapo ne estas baza kondiĉo por la esperanto-asocio. Tio montras ekzemplo de multaj okcidentaj asocioj, kiuj pliparte havas oficejon en la privata loĝejo de la prezidanto kaj nur la arkivaĵoj estas prizorgataj aparte. Se vi nun skribas al la asocio, ne skribu plu Jílská ul. Sed Praha 1, 11121, poŝtkesto 1069, alimaniere la sendaĵo ne devas esti enmanigita. Grava estis solvo de la valorego biblioteko de la praga klubo – heredaĵo post s-ano Jaroslav Šustr, karmemora. Pri librotenado estis komisiita sian kapablon multfoje pruvinta s-ano Jiří Patera, profesia fakulo. Starton prizorgas pruvinta tandemo Malovec-Daněk en Brno. Kvankam alporto de freŝaj informoj estas ĝis daŭra problemo, ĝi estas literature kaj lingve valora helpilo por ĉiu asociano. La redaktoro urĝe bezonas informojn pri la vivo de la kluboj, por ke la gazeto povu alporti veran bildon de la movada vivo en nia ŝtato. Klubestroj estis instigataj sendi informojn pri esp.renkontiĝoj al la prezidanto Vladimír Kočvara (Opava, ul.Ant.Sovy 10), kiu kompilas asocian kalendaron. Ĉe nia asocio vi povas aboni ankaŭ Slovakan esperantiston. La referaĵo de inĝ Chrdle plue ni estis informitaj, ke kelkaj kluboj plendas pri luado de ilia klubejo, kiun ili ne povis pagi. Pro tio malgrandaj lokaj kluboj nur kunvenas pliparte en la privataj loĝejoj aŭ en gastejoj. Financa bazo estas certigata precipe de la asociaj membroj. Nun malleviĝis la kvanto de membroj al 1300, tamen la enspezo estas malgranda, ĉar 450 el ili estas de la kategorio F (dumvivaj membroj) kiuj ne plu pagas. Oferemo de niaj membroj montriĝis post la unua alvoko de la asocio, en kiu estis membraro informata pri la kriza situacio. Venis subtenoj – pli ol 20000 Kč. Plu prezentiĝis bonvolo en formo de donaco de kuponaj libretoj. Anonciĝis 40 membroj el kiuj 30 vere donacis aŭ la tutan libreton, aŭ nur ĝian parton.

Al lingva komisiono venis neniu peto pri korekto de iu verko. Ekzamenan komisionon petis du kandidatoj. Pro tiel malgranda kvanto la komisiono ne kunvenis. Ankaŭ por la pedagogia komisiono mankas agado. Teknika komisiono preparas eldonon de la esp.-ĉeĥa vortaro, kiu jam estis finfarita kaj kuŝas preparata, freŝdata, enhavoriĉa. Pro sia lingva riĉeco ĝi povas servi ankaŭ al la aliaj ŝtatoj. Ĝi estas merito precipe de samideanoj Kraft, Hršel, Malovec, Laube. Tre aktiva dank' al ilia membra bazo estas fervojista sekcio, kiu aranĝas regule siajn kunvenojn, vizitataj ankaŭ de nefervojistoj. Vivo de medicinista sekcio stagnas, tamen la eldonado de ĝia bulteno SANO ne česis dank' al oferema eldonojo KAVA-PECH, kiu transprenis la taskon de financado de la eldonado.

Aktivado de junulara sekcio estas kontentiga kaj realiĝis kelkaj renkontiĝoj. Bedaŭrinde granda pliparto kaj preskaŭ tuta komitato estas ina, kies intereso kutimas esti efemera kaj limigata per la aĝolimo, kiam la knabinoj fondas siajn familiojn kaj patrinaj devoj forlogas ilian intereson, krom raraj esceptoj. Katolika sekcio montris vivkapablon per realigo de konata tendaro en Sebranice, multfoje laŭdata en eksterlanda esperanta preso. Certe rolas grave la favoro de kardinalo Vlk, kiu en sia junaĝo estis estro de la esperantista junularo en České Budějovice kaj subtenas la sekcion, eĉ per propra prezento de diservo en esperanto. Vokas la posteno de la ĉefdelegito. La ĝisnuna – samideano Rýznar abdikaciis, tamen pro nenia anstataŭanto li promesis deĵori ankoraŭ jaron. Handikapula sekcio, havante internacian karakteron, memstariĝis kaj ĝia aktiveco povas plezurigi ĉiun esperantiston. La sekcio havas bonajn kondiĉojn por plua disvolvo. Nun ĝi preparas pluan konferencon en Skokovy (1.-9.VI.95 – informoj ĉe s-ano Josef Vaněček, ĉe s-anino Rýznarová, Na okrouhlíku 21, 53003 Pardubice). Iliaj konferencoj estas valoraj precipe pro sia instrua karaktero kaj amika etoso. Eĉ nehandikapuloj estas bonvenigataj. Sennacia asocio tutmonda aranĝis sian konferencon en Strážnice. La preparon gvidis lokaj esperantistoj frunte de Vláďa Hasal, kiuj faris la impreson neforgesebla kaj firmigis la etoson de niaj partoprenantoj. Precipe valora estis ligo de amikecoj de eksterlandaj gesamideanoj kun la niaj. Precipe francaj SATanoj estas konataj pro sia gastemo kaj intertraktoj de multaj reciprokaj vizitoj realiĝis. La vojaĝagentejo TILIO (geedzoj Dvořákovi el Prago) sukcese aranĝis ekumenian konferencon en Tábor kun riĉa eksterlanda partopreno kaj prezento de novaj pripensigaj ideoj. En Brno ĉe s-ano Malovec estis fondita literatura fonduso, kiu espereble instigos novajn aŭtorojn kaj riĉigos nian literaturon, spite financajn barojn limigitajn eldoneblecojn. Elstaras la agado de s-ano Jiří Pištora, kiu savis la pragan bibliotekon, lokante ĝin en la urban muzeon de Česká Třebová, eluzante siajn eblojn el funkcio de urba vicestro kaj biblioteka direktoro. Ne forgesu viziti la bibliotekon. Ĉiuj kluboj estas alvokataj sendi historie gravajn cirkulerojn, malnovajn presaĵon, precipe tiujn, kiuj montras la vivon de la kluboj kaj valoron de esperantista movado por la vivo de nia socio. Volontuloj estas bonvenigadaj veni por helpi registradon de la libroj kaj profesian aranĝon de la librobretoj. Aliĝu kaj petu informojn ĉe J.P., E-klubo Česká Třebová. - Per unuminuta starigado en trankvilo estis rememorita mortinta s-ano Vuk Echtner, longjara gvidanto de la pedagogia sekcio kaj eldonanto de gazeto por blinduloj, mondkonata Auroro. - Pli ĝojiga estis gratulo al la nestoro de nia movado, jubilanta s-ano Josef Vondroušek, kiu 90-jariĝis kaj dum vespera dancado kelkfoje pruvis sian junecan freŝecon. (Turmentan atentigon pri maljuneco preparis estrara bukedo al la redaktoro de tiuĉi bulteneto okaze lia 70jariĝo). Kvankam ne disvolviĝis, tamen vivantaj estis ĉelimaj renkontoj. Tiaj aranĝoj pri sia karaktero estas certe esperdonaj. - La ŝtono de la koro falis al la ĉeestantoj post la raporto de la plej granda respondeculo Jiří Patera, ĉefkontisto, en kiu oni anoncis la ekvilibron de nia buĝeto dank' al gravaj ŝparcelaj restrikcoj. Ili montris ke ankaŭ sen granda diboĉado oni povas vivi, se la elspezoj harmonias al la elspezoj… Al la ekvilibro helpis subteno de SAT dumkongresa kaj luprezo de la glasvendejo en Jílská ul. Sukcesan librovendon dum konferencon aranĝis kasisto Pavel Polnický, kiu akceptis ankaŭ abonkotizoj por Heroldo 95 (ĝi estas ankoraŭ mendebla ĉe P.P. Poděbrady, Příčná 190.) -

El la plua programo nur koncize: La klubo en Prago perdis sian klubejon en Vejvodová strato, malnovurba. Dank' al oferemo de klubanoj oni sukcesis transporti la valoran bibliotekon al la muzeo Česká Třebová. Oni trovis konvenan klubejon, malmultekostan, en klubejo de rentistoj en Smíchov, Nádražní 56. Ĝi estas favore situita sur la ĉefstrato rekte kontraŭ la stacidomo, kelkaj paŝoj de la stacio de metroo U Anděla aŭ aŭtobusa stacidomo Smíchov Na Knížecí. La kunvenoj okazas ĉiulunde 18-20h kaj ĉiu dua komencas per la prelego de Eva Seemanová kun gramatika temo. Kiu aŭdis prelegi gramatikon de s-anino Eva, scias la valoron de tia vespero kaj certe venos. - Pri aktiveco de Slovaka Esperanto asocio informis oficiala delegitino s-anino Rektorysová. La agado de SEA en Poprad finis kun granda financa manko kaj nun estas la asocio en Bratislava, Racianska 80, 83102 Bratislava. La delegitino transdonis fratajn salutojn kaj proklamis, ke la asocio havas intereson helpi al nia asocio per aranĝo de antaŭkongresa aŭ postkongresa semajno en Bratislava, ev. en Altaj Tatroj. La prezidanto estas nun Augustin Čambal. - La laborkunsidon beligis prezentado de infana ensembleo en Trutnov, gvidata de oferema s-anino Mgr Janáková, kiu preparis longan kaj valoran programon. - S-ano Vaněček atentigis pri partopreno en UKo en Prago planata de handikapuloj kaj petis prepari konvenan malaltigon de kongresa kotizo por ili. Li petis ankaŭ rapidigi informojn pri diversaj aranĝoj, kiu kutime realiĝas jam pli frue ol aperas la varba anonco. La direktoro de UEA oficejo Milojeviĉ sendis mesaĝon, en kiu li asertas, ke UEA bone konas nian problemarojn kaj agas prudente – garantias kontraŭ la monperdo al la ŝtata EA, kie estas ĝi aranĝata. - Pri aktivecoj de la junulara sekcio informis ĝia prezidantino Lucka Karešová el Hořice. Junularo havas sian cirkuleron dumonatan (50Kč jare), kie vi trovos informojn pri aranĝotaj internacia renkontiĝoj junularaj 1995 en Prago kaj Budapeŝto. La sekcio havas 60 membrojn, el tio 2 delegitojn. - Drahoš Kočvara informis pri la agado de la propaganda sekcio. Eltranĉaĵo el la preso kolektas s-anino Rousková precize kaj zorgeme. Por varba laboro mankas centra afiŝo, kiun devus prepari la asocio (prezo por preso de la afiŝo = 20 Kč!). - Inĝeniero Kříž, estro de la klubo en Ústí ŝajne sukcesos aranĝi informajn elsendojn pri Eo en regiona elsendejo radio Ústí. Li plue varbis por la ĉeĥa-saksa renkotiĝo (17.XII.) kaj informis při ĝemeliĝo kun Kronach (Bavario). - S-anino Rýznarová fieriĝis pri regula eldonado de Informilo de handikapuloj – ĝi estas la plej freŝdata kaj malmultekosta el la e-gazetoj. Ŝi informis pri preparoj je esperanta handikapula giĉeto dum ekspozicio de neprofitaj organizaĵoj 1.-3.XII.94, la 7-a E-tago de la klubo en Pardubice – Kunětická hora, kaj pri kolektado de E-ludoj (instruaj.) - S-anino Květa Hubnová informis pri eblo de partopreno en karavano al UKo 1995 Tampere (11.700 Kčs+kongresa kotizo). Ing Chrdle Csc informas pri la aktivado de ĉeĥa AIS (ĈAIS). La gazetojn el ĈEA dissendas plu inĝ. Pluhař. Haveblas ankaŭ rusaj (ukrainaj) bultenoj SPEKTRO (kvaronjara)-120 Kč, kaj La ondo (235 Kč). Plue li referis pri Turisma foiro en Bydgoszcz (verda turismo), kiu lin iom seniluzigis. - Sekcio de nevidantoj: la gvidanton Vychodil anstataŭis s-anino Hubnová. Por esperantistoj-blinduloj estis aranĝita rekondicia semajno ek de 26.VII. en Bílá Třemešná. Ŝi alvokis por varbi por ZORA,

gazeto de nevidantoj, longjare gvidata de ĵus forpasinta s-ano Vuk Echtner el Domažlice, konata folklora propagandisto. Inĝ Kovář en nomo de frervojista sekcio (anstataŭ s-ano Tomíšek, estro) informis pri la agado. Li varbis pri konferenco de esp. fervojistoj el Kunčice pod Ondřejníkem (21.- 23.IV.95). - S-ano Laŭbe venis spite travivatajn gravajn lasttempajn malsanojn, kaj informis pri aktivecoj de la teknika sekcio kaj la klubo en Roudnice, kiu havas sian francan ĝemelon. Bela koncerto kun operaj arioj prezentataj de s-ano Miroslav Smyčka precize akompanata je piano de prof. Vlastimil Novobilský estis por ĉiu muzikŝatanto granda travivaĵo. Poste sekvis la dancvespero kun granda tombolo aplaŭdata de siaj ŝatantoj.

Dimanĉe daŭrigis la programo per plua diskuto. S-ano Sittauer atendigis při la 100jara datreveno de prof. Kilian. Ĉiokaze estis eldonita lia fama lernolibro en sepa eldono, nove kompilita kaj modernigita de konata germana s-ano Dieter Berndt, ĉiujara vizitanto kaj instruisto en SET Lanĉov. Malagrable estis aŭdi pri malkresko de intereso  pri Lanĉov kiu estas nur parte eluzata por esperantistaj someraj kursoj. - S-ano Chrdle Csc gratulas slovakojn por sukcesa traktado kun ministerio de lernejaferoj en Slovakio, kiu konfirmis 70 studhoran planon por instruado de Eo kiel nedeviga objekto. La informo de s-ano prof Rotrekl: ankaŭ ni povas ĝoji pro mencio pri Esperanto en la lernolibro pri ĉeĥa lingvo por la kvina sinsekva lernejjaro. Ĉiu infano gajnas tiamaniere oficialan informojn pri nia internacia lingvo. Tiun fakton oni devas eluzi por ripetu provo de instruado en bazaj lernejoj. Atentigu lernejestron de via lernejo pri tiu ĉi fako kaj kaj proponu Vian helpon, almenaŭ per pli detala ĉeĥlingva informo kaj sekva varbo por korespondaj kursoj. S-ano Chytil el Přerov informas pri regulaj kunvenoj ĉiumonatoj de trifolio Přerov-Olomouc -Vyškov  en la klubejo de la stacidomo fervojista en Přerov, kie okazas kunordigado de la agado de tiuj ĉi kluboj. - S-ano Jiří Pištora, meritplena bibliotekisto el Česká, kiu savis la pragan bibliotekon, atentigas pri graveco de arkivado de klubaj cirkuleroj kaj ĉiuj materialoj, kiuj referas pri la aktiveco de la kluboj. - Kontrola komisono (s-ano Linhart Rýznar) referas pri favoraj kontrolaj agadoj. Li preparas dissendon de klubaj demandiloj, por gajni precizan informon pri la agado de la kluboj. - Drahoš Kočvara informis pri varba aktiveco en metilernejo en Ostrava, kie li povis 15 minutojn varbi en ĉiu klaso kaj disdoni fluglofiojn pri Eo. Li rekomendas ankaŭ peti uzon de klubejoj de rentistoj, kiuj volonte helpas. Laŭ spertoj de s-anino Klegová el Poruba oni povas sukcese peti reservon de lirobreto esperanta en lokaj bibliotekoj. - Inĝ Chrdle atentigas pri graveco de seriozaj informoj pri Eo. Multaj stranguloj malhelpas propagandon de Eo. Konata estas lia eldiro, ke Eo venkos malgraŭ esperantistoj. Necesas propagandi Esperanto en sciencaj rondoj. - S-ano Laŭbe referas pri siaj spertoj en enkonduko de Eo en lernejoj substrekante al pedagogoj propedeŭtikan valoron de Internacia Lingvo. - Demandon de inĝ Kříž pri pagado de impostoj klubaj respondas la prezidanto inĝ Kočvara per sciigo, ke la problemon solvos la nova leĝo pri neprofitdonaj organizaĵoj. - Inĝ Polák atentigas pri graveco de serioza lingva studo. Eo ne estas hobio. - Radim Hradec Králové preparis intervjuon pri Eo kun s-anino Rýznarová. - S-anino Bartovská aludas pri faka uzo de Eo kaj alvokas por verki fakajn lernolibrojn specialaj por unuopaj fakoj. - Pri la UKo 96 en Prago oni krom precizigo de la dato nemulte parolis. - En la fina vorto de prezidanto inĝ Kočvara li taksis la trairon de sukcesa konferenco. Ĉie regis plena kontenteco pri kiu en la plej granda mezuro meritis la aranĝanta klubo en Česká Třebová, kiu helpis eĉ per preparo de malmultekostaj sukeraĵoj kaj

montris, kia samideana etoso regas en ilia klubo, modela por aktivecoj de aliaj kluboj en nia patrujo. Krom lokaj renkontiĝoj anoncitaj por la jaro 1995 estas denove planata tutŝtata konferenco dum aŭtuno. La loko estos ankoraŭ anoncita kaj dependas de la kuraĝo de iu kluboj, kiu povus prepari prizorgon por ĉirkaŭ 150 partoprenantoj. Amike ni kunvenis, amike ni traktis sennube, kaj kun bedaŭro ni amike disiris.

Esperantaj renkontiĝoj: Certe la plej grava okazintaĵo estis la tutŝtata konferenco en Česká Třebová kaj pro tio ni disponigis al la raporto la plej grandan spacon. Tamen ni devas atentigi ankaŭ pri aliaj same gravaj lokaj renkontiĝoj: La 7-a Internacia kultura festivalo en Ústi okazis 30.IX.-2.X. en Ústí nL kun partopreno de 70 personoj (inter ili 27 eksterlandaj gastoj el Germanio, Katalunio, Svedio!) sendifekte aranĝita de oferemaj gesamideanoj jam tradicie kun riĉa arta programo kaj ekskursoj. - La unua Esperanto tago okazis en Ostrava na 1-an de Oktobro kun partopreno de 55 gesamideanoj. Inter ili 5 venis el Polio. Regis amika gaja programo kun kultura kaj amuza enhavo. - Ankaŭ la gesamideanoj en Hradec Králové ne dormis kaj aranĝis regionan kunvenon la 15an de oktobro 1994. Ili interkonatiĝis precipe pri historiaj valoraĵoj de la malnova urbo. - Novestablita trafikfakultato de Jan Perner (53009 Studentská 89, Pardubice) preparas (19.-21.IX.94) Internacian scienckonferencon je temo „Nova kvalito en trafiko kun parta uzo de Esperanto. Vian eventualan helpon anoncu ĉe inĝ. Zdeněk Polák. -

Prof. Dro Rudolf Horský (14100 Praha-Spořilov, Jihovýchodní 945 teologo kaj meritplena esperantisto, longjara instruisto de Eo en Lanĉov, estinta estro de la klubo en Prago, malsanas, malbone piediras, suferas pro okulmalsano, kaj pro tio li ne plu kapablas partopreni esperantaj kunvenoj. Certe ĝojigus lin via bildkarto kun saluto, kiu pruvus, ke ni ne forgesas niajn meriplenajn samideanojn.

Konferenco de E-fervojistoj: 21.-23.IV. Kunčice pod Ondřejníkem. Informoj Jindřich Tomíšek, 75118 Říkovice 33.

Esperantista Vegeterano – bela gazeto kun riĉa enhavo kaj receptoj senvianda kuirejo, dank' persistemo de Arnošt Váňa el Ludince kaj kunlaborantoj aperis en pluaj du numeroj. Vi povas mendi ĝin ĉe Adolf Veselý, 62300 Brno, Libušino údolí 146.

Inter la tagoj 1.-3.de decembro okazis en Prago 7, Veletržní palác ekspozicio Homoj al la homoj – Lidé lidem, kiu estis trarigardo pri aktiveco de 407 asocioj kaj fondusoj senprofitaj. Inter ili estis ankaŭ giĉeto de Esperantistoj-handikapuloj, kiuj prizorgis oferemaj anoj de la asocio J. Mařík, J. Patera kaj aliaj. Ili disdonis flugfoliojn pri la celo de la movado, trarigardon pri la gramatiko, broŝuretojn pri problemo de -igi kaj -iĝi, eĉ dolĉaĵon - verdajn kristnaskajn sukerajn steletojn. Varbado inter homoj kiuj venis pro viziti defilon de bonfartaj organizaĵoj precipe zorgantaj pri la sorto de handikapuloj certe havis sian sencoj kaj gvido por plu disvatigo de nia internacia lingvo, kiu estus lingvo de interkompreniĝo de handikapuloj el la tuta mondo. Ĉiupaŝe la organizaĵo montras, ke la propagandon oni povas fari malmultekoste kaj efike. Ni ĉiuj helpu!

S-ano Mařík, senlace historiisto kaj propagandisto de IL, per sia letero el 8.X.94 atentigis la novan entrepreniston de Palaco Žofín okaze ĝia nova malfermo post rekonstruo pri la historio de la palaco

kaj rilato al la esperanta historio. Nome okazis tie la Universala kongreso en la j.1921, dum tempo de la plej granda disfloro de IL-o. Partoprenis en ĝi pli ol 2000 gesamidanoj, reprezentanto de la Asocio de nacioj el Ĝenevo; malfermis ĝin la ministro por lernejaferoj kaj ministro por eksterlandaj aferoj Dro Eduard Beneš partoprenis dum la solena vespermanĝo de la UEA-komitato. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de Internacia oficejo por laboraferoj kaj Internacia komitato de la Ruĝa kruco. Dum la kongreso estis fondita Sennacia Asocio Tutmonda (SAT), pri kio atestas la memortabulo. Al s-ano Mařík tamen ne plaĉas la nomo Žofín, honore al la per fajlilo trapikita edzino de la imperiestro.

Pluan malhelpon por nia movado signifas malagrabla novaĵo: Ĉeĥa kaj slovaka registraro, kiu devas reprezenti la interesojn de siaj civitanoj ne kapablis interkonsenti pri tiel baza afero, kia estas dogana poŝta unio. Pro tio, laŭ atentigo de nia poŝtoficejo, ni pagos por ĉiu sendaĵo al Slovakio kiel en aliajn fremdajn landojn, ne povante uzi takson por presaĵoj (8 Kč!). Tiun sumon ni memkroprene ne povas pagi kaj tial ni alvokas trovi kuraĝan peranton por Slovakio. Ni -kvankam kun financa perdo – sendos al li amasan sendaĵon, ne petante rekompencon. Lia devo estus dissendi al de ni indikitaj adresoj kaj preni de niaj abonantoj ilian libervolan monsumon, kiun li uzus por poŝtelspezoj. Ni faras la aferon por vivteni la kontakton kun gefrataj slovakaj esperantistoj. Pro tio ni klopodos fruiĝi kaj sendi ĉi tiun numeron ankoraŭ ĉijare.

## *Kiel diri?*

Praktika esperanta frazeologio de Lantaigne. La temo: KORPO.
Kiso: kovri iun per kisoj. Steli kison. Premi kison sur ies vangon. - DENTO: karia, baznudigita; falsa, artefarita, hokradika, plombita. Denta absceso, alveolo, eburo (dentino), emajlo, kavo, krono, nervo, kario. Incizivo (tranĉdento), kanino (kojdento), molaro (mueldento). Laktodento, saĝodento, cerviko, radiko, krono, medolo, nervo, dentopinglo (por purigi dentojn), tartro (kámen zubní); eltiri denton, dentotirilo (kleště), drilo (vrtáček); obturi per cemento dentan karion, plombo, plombaĵo, kroni, kronaĵo. Falsa dentaro (chrup), protezo. Kunpremi la dentojn (zatnout z-per obstino). Montri la dentojn (minaco). Murmuri tra dentoj (procedit). Liaj dentoj klakas de malvarmo, timo. - VIZAĜO. MIENO: Vosta, nesimetria, haŭta (el ledo) velkinta, zorgoplena, morta, pala, nepenetrebla, nelegebla, nedeĉifrebla, pokera, senesprima, surverŝita, humida (vlhký), banita de larmoj, absorbita, agrabla, afabla, delikata. - Vizaĝo heliĝas; nubo pasas sur lia v.; ekflamas. Vizaĝon razi, pudri, ŝminki (ŝminkita kiel prostituino). Tomba paleco de vizaĝo. Havi la stampon, sigelon de io sur la vizaĝo. V.ion spegulas. Priridi iun al v., ĵeti insulton, ofendon al ies v. Kaŝi sian v-on post (en) la manojn. - MIENO malĝoja, trista, afabla, grava, indiferenta, stulta, kontenta, funebra, severa, ruza, taŭzita (rozcuchaný), tre ĝenita, veaspekta (bědující). Havi vinagron en la mieno. Li faris mienon kvazaŭ li laboras. Mieni kiel la masanulo. Mieni mielon al iu. Trajtoj delikataj, neniondiraj, ĉarmaj, fajne gravuritaj, ĉizitaj (vydlabané), cizelitaj. Harmonio de la vizaĝaj trajtoj. Salono de beligado (krásy). Beligistino. -

La redaktoro dankas elkore al ĉiuj amikoj, kiuj rememoris per gratulo lian vivjubileon (bedaŭrinde 70-jariĝon), ne havanta alian eblon.

## KORESPONDI DEZIRAS

Věra Muchnová, 38601 Strakonice-Přední Ptákovice, Na stráni serĉas kunlaborantojn komercajn kaj proponas al ili profitdonan vendadon de bonkvalita amerika varo kaj aliaj aktivecojn. Ŝi informos vin detale.